4 € - www.satesperanto.org

04-06
1438-1440

Aprilo -Junio
2025

# Sennaciulo

**Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda**










*SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens-, kaj agadkapablo*

# KOTIZOJ – PERANTOJ – KOLOFONO

**Kotizo 2024-2025**

| | |
|---|---|
| Argentino | 8 € |
| Aŭstralio | 48 € |
| Aŭstrio | 48 € |
| Barato | 4 € |
| Belgio | 48 € |
| Bosnio-Herc. | 8 € |
| Brazilo | 16 € |
| Britio | 48 € |
| Bulgario | 8 € |
| Ĉeĥio | 24 € |
| Ĉinio | 12 € |
| Danio | 48 € |
| Estonio | 16 € |
| Finnlando | 48 € |
| Francio | 48 € |
| Germanio | 48 € |
| Grekio | 8 € |
| Haitio | 4 € |
| Hispanio | 36 € |
| Hungario | 16 € |
| Irano | 8 € |
| Irlando | 48 € |
| Islando | 36 € |
| Israelo | 36 € |
| Italio | 44 € |
| Japanio | 48 € |
| Kanado | 48 € |
| Kolombio | 8 € |
| Kongo, DR | 4 € |
| Koreio | 36 € |
| Kostariko | 12 € |
| Kroatio | 16 € |
| Kubo | 4 € |
| Latvio | 12 € |
| Litovio | 12 € |
| Luksemburgio | 48 € |
| Madagaskaro | 4 € |
| Makedonio | 8 € |
| Malio | 4 € |
| Meksiko | 12 € |
| Mongolio | 4 € |
| Nederlando | 48 € |
| Nepalo | 4 € |
| Norvegio | 48 € |
| Pollando | 16 € |
| Portugalio | 24 € |
| Rumanio | 12 € |
| Rusio | 12 € |
| Serbio | 8 € |
| Slovakio | 16 € |
| Slovenio | 16 € |
| Svedio | 48 € |
| Svisio | 48 € |
| Tajvano | 32 € |
| Turkio | 12 € |
| Ukrainio | 4 € |

**Aŭstralio**
Franciska Toubale
1 Marne Road
Mount Evelyn
Victoria 3796
Aŭstralio
rete: fran14 ĉe bigpond.net.au

**Belgio**
Claude Glady
Rue du Culot, 1
BE-5630 Cerfontaine
Belgio
Tel-Fakso-Respondilo: +32 (0)71 644916
Rete: cglady ĉe arcadis.be
Bankkonto: 750-6373051-18
IBAN: BE 50 750-6373051-18
SWIFT/BIC: AXABBE22

**Bosnio-Hercegovino**
Fetah Zvirac
Esada Pašalića 6
71000 Sarajevo
Bosnio-Hercegovino
rete: fetahzvirac ĉe gmail.com
tel (poŝa): +387 (0)61 170 094

**Brazilo**
Fernando Pita,
Estrada Coronel Vieira, 134, Bl 03
Ap 402, Bairro Irajá
BR-21220-310 Rio de Janeiro
rete: magisterpita ĉe gmail.com
tel: +55 21 98863-3854

**Britio**
Arturo Prent
7 Walton Gardens
Hutton, Brentwood
Essex CM13 1EJ
Britio
tel: +44 1 277 22 89 62
rete: ap esp-sat21 ĉe yahoo.co.uk
Nomo: «SAT SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA»
Bank-kodo: 09 01 56
Kont-n-ro: 57604003
IBAN: GB62ABBY09015657604003
SWIFT/BIC: ABBYGB2LXXX
Averto 1: Se vi uzas Bank-kodo plus kont-n-ro kaj mistajpas, la bank-sistemo ne kontrolas la nomon, kaj la pago povos atingi malĝustan konton
Averto 2: Kont-eltiroj venas nur tri-monate. Nepre sendu retmesaĝon kiam vi sendas la pagon.
Se vi malbonŝancas, eble estas longa paŭzo ĝis eblas konfirmi vian pagon.

**Bulgario**
Metodi Markov
Vasil Levski, 20
BG-2700 Blagoevgrad
Bulgario
tel (fiksa): +359 73882791
tel (poŝa): +359 879040403
rete: mam1948 ĉe abv.bg
IBAN: BG98FINV915010BGN030E5
SWIFT/BIC: FINVBGSF

**Ĉinio**
HENRY Bruno
rete: esperantobhenry ĉe yahoo.fr
WeChat: Bruno57240
Kotizojn pagu al la konto de SAT ĉe PayPal:
financoj ĉe satesperantoorg
aŭ al konto de SAT ĉe UEA: satx-s

**Francio**
Barthélémy Maurau
Appartement 120
3 allée Nathalie SARRAUTE
FR-27000 EVREUX
Francio
rete: barthelemymaurau ĉe free.fr

**Germanio**
Gary Mickle
Brüsseler Straße 6
DE-13353 Berlin
Germanio
rete: gmickle ĉe nexgo.de

**Hispanio**
PARRA-BENITO Luis-Manuel (Manolo)
C/ALPUJARRAS 24, BAJO B
ES-28032 MADRID
+34 913 01 48 44
manoloparra@yahoo.es
IBAN: ES9001821294180202776277
Banko BBVA

**Hungario**
PETIK Janos
Hársfa u 31 I/7
HU-3104 Salgótarján
Hungario
rete: kitepsonaj ĉe gmail.com

**Italio**
Nicola Ruggiero
Corso Palermo 12
IT-10152 TORINO (TO)
Italio
rete: nicolaruggiero1986 ĉe gmail.com
IBAN: IT05Z0347501605CC0011648125
SWIFT/BIC: INGBITD1

**Izraelio**
Jehoŝua Tilleman
97-A Dereh-Akko
IL-26373 Kirjat-Mockin
Izraelio
rete: b48705544 ĉe 013net

**Japanio**
Nakamura Daiŝin
Shinagawaku Yashio 5-6-39-1006
JP-140-0003 Tokyo
Japanio
rete: sat-peranto-japana ĉe googlegroups.com
Poŝtkonto: 00980-9-37624 SAT-Nihon

**Katalunlingvio**
Sandra Vives - KEA
Apartat 1008
ES-08200 Sabadell
Hispanio
Tel: +34 93 716 36 33
rete: sandra ĉe esperanto.cat

**Koreio**
Jung Hyunsoo (Paz)
4014-2202, 156, Gwangyomaeul-ro
Yeongtong-gu
KR-16510 Suwon-si, Gyeonggi-do
Koreio
rete: paze23 ĉe gmail.com

**Kroatio**
Ivica Ŝĉepanoviĉ (Truto)-pošte
HR-21414 Gornji Humac (Otok Brac)
Kroatio
Tel: +385 21647059
Poŝtel: +385 0981827907
rete: ivicascepanovic1 ĉe stt-com.hr
Bankkonto: 3105505351 otpbanka
IBAN: HR51 2407 0003 1055 0535 1
SWIFT/BIC: OTPVHR2X

**Litovio**
Gražina Opulskienė
Obuoliuko 42
LT89213 Mažeikiai
Litovio
Tel: +370 68736457
rete: grazopul ĉe yahoo.com
Bankkonto: LT347300010001720030
SWIFT/BIC: HABALT22, Swedbank

**Madagaskaro**
Henriel Fidilalao-Firaisana
Lot Iag 27 B Antoetra
MG-102 Ambohidrapeto
Madagaskaro
Tel: +261 33 11 268 36
rete: fidilalao@yahoo.fr
Banko: BVF Societe Generale 00007 Tsarallana
IBAN: MG4600008000070500100024103
SWIFT/BIC: BFAVMGMG

**Norvegio**
Cécile Anda
Esperantoveien, LI
NO-4320 Hommersak
Norvegio
rete: cmranda ĉe frisurf.no

**Pollando**
SŁOWINSKI Grzegorz (36213)
Przemysłowa 4/181,
PL- 31-046 KRAKÓW,
Pollando
rete: gjslowinski ĉe gmail.com
Tel: +48 600 944 734

Portugalio
PAZ Alexandra kaj PRIETO Roger
JOAQUIM ANTONIO DE AGUIAR 100, 1°
PT- 4000-309 PORTO

**Portugalio**
rete: alexandrapaz ĉe gmail.com
kaj rogerprieto ĉe gmail.com
Tel:+351 916 793 285 / +351 915 067 954
Banko: Caixa Geral de Depósitos
Konto: 0748007271900
IBAN: PT50003507480000727190049
BIC/SWIFT: CGDIPTPL

**Rusio**
Nikolao Gudskov
a/k 57
RU-105318 Moskvo
Rusio
rete: nikolao ĉe yandexru

**Serbio**
Vakas

**Svedio**
Inga Johanson
Stampgatan 60B-1202
SE-411 01 Gotenburgo
Svedio
rete: ishim ĉe hotmail.com aŭ ingajohansson50 ĉe gmail.com
Poŝtkonto: Svenska arbetaresperantoförbundet, n-ro 5 31 60-8
IBAN: SE75 9500 0099 6026 0053 1608
SWIFT/BIC: NDEASESS

**Svisio**
Dieter Rooke
Interlakenstr 122A
CH-3705 Faulensee
Svisio
rete: rookedieter ĉe gmail.com
tel: +41 62 396 01 86

**Ukrainio**
Andreo JANKOVSKIJ
str Lajosha Havro 11-B, ap 68
UA-04211 KIJV
Ukrainio
rete: andreoespero ĉe gmail.com
telefone: +380 67 99 470 03

**Ĉiuj landoj**
SAT-Sidejo
67 av Gambetta
FR - 75020 Paris
Francio
Tel: (+33) 09 53 50 99 58
rete (ĝenerala retadreso): kontakto ĉe satesperanto.org
rete (pri financaĵoj): financoj ĉe satesperanto.org
Poŝtkonto: 1234 22 K, La Banque Postale, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
SWIFT/BIC: PSSTFRPPPAR
eblas pagi ankaŭ al la konto de SAT ĉe UEA: satx-s
aŭ al la konto de SAT ĉe PayPal: financoj ĉe satesperanto.org

## SAT


Asocia sidejo de SAT:
67 avenue Gambetta,
FR-75020 Paris, Francio
Retadreso: kontakto@satesperanto.org
Retejo: http://satesperanto.org
Tel: (+33) 09 53 50 99 58
Poŝtkonto: 1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: satx-s
Konto de SAT ĉe PayPal: financoj@satesperanto.org

Pri financaj aferoj sendu al: financoj@satesperanto.org
Libromendojn sendu al: libroservo@sat-amikaro.org
Librajn eldonproponojn sendu al: eldonkoop@satesperanto.org



Plenum-Komitato
Prezidanto: Vinko Markovo
Vic-prez.: Paz (Jung Hyunsoo)
Sekretario: Toshiko Hatachi
Kasisto: Bruno Henry
Vic-kasisto: Alexandra Paz
Ceteraj membroj: Guillem Gomez-Blanch, Miguel Sanchez, Dominiko Simeone
Reprezentantoj de SAT en la LEA-Komitato: Guillem Gomez-Blanch kaj Miguel Sanchez


## Sennaciulo


Oficiala organo de SAT

Redaktoskipa kunordiganto: Vinko Markovo
Enpaĝiganto: Lucile Brobeck kaj Serĝo Sir’
Ceteraj redaktantoj: Djémil Kessous, Gary Mickle, Grazina Opulskiene, Marcelo Redulez, Nicola Ruggiero, Richard Schneller kaj Franciska Toubale

Presita de: Ulzama Digital, Pol Ind Areta, C/ Altzutzate, 51
31620 Huarte (Navarra), Espagne
Aperas po 6 numeroj jare (dumonate/bimestriel), minimume po kvar (trimonate/ trimestriel)
Jara abono: petu la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro

Dépot légal à la date de parution

N° CPPAP 05 25 G 86567
N°ISSN:1163-0442


# REDAKTANGULO

Karaj legantoj,

Jen numero antaŭkongresa laŭ la formalaj datoj, kaj parte postkongresa laŭ enhavo. Vi ja trovos en ĝi samtempe la raportojn dumkongrese akceptitajn, la deklaracion kaj gvidrezolucion, raportojn de kongresintoj kaj ĝisdatigojn, interalie pri la venonta kongreso, okazonta inter la 19a kaj 26a de julio 2026 en la urbo Leono, en samnoma provinco de Hispanio. Informoj pri la aliĝilo, kiam haveblaj, aperos ĉe la jena adreso: ***https://eventaservo.org/e/46e555***

La SAT-retejo dum la somero retrovis siajn bildojn kaj la ensalutan interfacon por la enhavaj ĝisdatigantoj. Tamen restas solvendaj problemoj pri ĉifrado de pasvortoj, kiuj daŭre malhelpas enmeton de ĝisdataj informoj. La organizantoj de la venonta kongreso cetere intencas starigi propran retejon, kiu do ne dependos de la plena refunkciigo de tiu de SAT.

Aldone al prikongresaj aferoj, tiun ĉi numeron riĉigas kontribuoj pri diversaj temoj. Koran dankon al ĉiuj, kiuj plu sendas materialon! Kaj por tiuj kiuj ankoraŭ ne prizorgis tion, bonvolu pensi pri akurata pago de via kotizo. Tio ankaŭ helpas limigi la postkuradon de malfruantoj, kaj liberigas laborfortojn por aliaj taskoj.

Agrablan legadon deziras al vi

La redaktoskipo

**KOVRIL-PAĜA BILDO**

**Supre : «Oficiala» foto de l’ 98a kongreso (fotis Kani)**

**Sube : foto pri laborkunveno inter du fotoj pri vespero de revoluciaj kantoj (fotis Gary)**

# ENHAVO


***Ekologa novelo***
4 - La semvalizo

***Laborista Esperanto-movado***
5 - La graveco de la Laboristaj Esperantaj Asocioj

***Teknologio kaj socio***
6 - Amasmensogo

***Anarkiismo***
10 - Alvoko al solidareco

***Tra la mondo: Eŭropo***
11 - La lecionoj de la leĝdonaj, komunumaj kaj regionaj balotoj en Svedio

***Kongresraportoj***
14 - Agadraporto de la Plenum-Komitato por la periodo de Junio 2024 ĝis Julio 2025
18 - Financoj
20 - Raporto de la Ĝenerala Konsilantaro kaj Konfliktkomisiono 2024-2025
21 - Deklaracio
22 - Gvidrezolucio 2025

***Spertoj pri la 98a SAT-kongreso***
23 - Kongreso senstreĉa
25 - Ni hezitis ĉeesti…
26 - Serena etoso

***Historio - Poezio***
26 - La Te Deum de 1a de januaro 1852

***Poezio***
28 - Du poemoj de komunistoj


**PRI LA ENHAVO DE LA ARTIKOLOJ RESPONDECAS LA AŬTOROJ MEM**

Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas

Kontribuojn sendu elektronike al sennaciulo.redaktejo@gmail.com

Aŭ paperpoŝte al SAT-Amikaro, 132-134 boulevard Vincent Auriol, FR-75013 Paris, Francio

# La semvalizo

Sonja estis modesta instruistino pri biologio en provinca lernejo. Ŝi havis nek aŭton, nek poŝtelefonon. Ŝi havis unu valizon malgrandan, malnovan, el lina tolo kaj juto kun naivaj brodaĵoj de siaj gefiloj: sunfloro, rano, koreto kaj surskribo: “Ne ekzistas planedo B.”

Ŝi ĉiam veturis per trajno. Ne pro romantikemo, kvankam ŝi ŝategis rigardi pejzaĝojn tra la fenestro, sed ĉar ŝi diris: “Ni jam ŝuldas al la tero pli ol ĝi al ni. Sen naturo, ne futuro. Urĝas agi por la klimato!”

En aŭgusto ŝi devis iri al konferenco pri klimata edukado en Romo. Kiam ŝi alvenis en la stacidomo, ŝi trovis ĝin plena je vojaĝantoj, kiuj atendis pro tria tago de transporta striko. Multaj koleris. Iu kriis:




— Ĉu ili pensas, ke ni povas flugi kiel birdoj?

kaj alia:

— Ĉu mi do atingu mian laborejon per balono?

Sonja trankvile sidis sur sia valizo, trinkante mentan teon el reuzebla botelo. Apud ŝi sidiĝis adoleskanto ludanta per poŝtelefono. Ŝi alparolis lin proponante ekdiskuton:

— De kie vi venas?

Li levis la rigardon kaj ridetis, vidante ŝian valizon.

— Kion vi portas en tiu stranga valizo?

— La estontecon, ŝi respondis.

— Ĉu vi, samkiel sciencistoj, ĉiam parolas enigme? miris la junulo.

Ŝi ridetis kaj malfermis la valizon. Ene estis nek vestoj, nek tekokomputilo, nek dokumentoj, sed... semoj! Nur saketoj da semoj! Ĉiu kun etikedo: karoto por 2050, tropeolo por koloro, tritiko por naskiĝontaj infanoj, kverko por memoroj...

— Ĉio tio estas por la posteularo, kiu eble vivos en la jaro 2100. Sed se ni ne sukcesas senprokraste ŝanĝi la direkton, ili devos manĝi plaston.

Li elprenis unu semon, longtempe rigardis ĝin. Poste iom honteme li formetis sian ekranon kaj petis:

— Ĉu vi bonvolus instrui al mi planti ĝin?

Ili pasigis la posttagmezon kun semoj kaj ideoj, preparante bedon ĉe la stacidomo inter valizoj. Aliaj homoj aliĝis. Kelkaj helpis per ŝoveliloj, aliaj donacis akvobotelojn. Iu artisto eĉ pentris sur la planko: “La vojo al estonteco komenciĝas inter la reloj” kaj alia aldonis “Envojigu vin al espero.”

La trajno al Romo fine venis du tagojn poste. Sonja ne envagoniĝis. Ŝi estis jam komencinta pli gravan vojaĝon.

Hortie, 21a de julio 2025

Marcelo Redulez, 32846





# La graveco de la Laboristaj Esperantaj Asocioj (LEA-oj)

En la komenco de la 20-a jarcento, baldaŭ post la apero de Esperanto, starigitaj estis Laboristaj Esperantaj Asocioj (LEA-oj), kies celo estis disvastigi Esperanton en laborista medio, kompreneble kune kun valoroj de la laborista klasbatalo. Kiam SAT aperis, la starigo de kunlaboro kaj dislimoj inter ambaŭ organizoj necesis kaj estis fakte difinitaj: SAT laboris precipe per Esperanto kaj la LEA-oj por Esperanto, precipe en la respondaj nacilingvaj areoj. Tiu laboro sekvadas dum jardekoj. Nun, en nia komplika epoko, ni demandas al ni mem, kia estas la plej bona strategio, per kiu SAT antaŭeniru en siaj celoj, kaj tiel ni volas pripensi la rolon de SAT-anoj rilate al LEA-oj en la estonta disvolviĝo de SAT.

Dum la 1920-aj jaroj, SAT estis fondita. La celo de la antaŭekzistantaj Laboristaj Esperantaj Asocioj (LEA-oj) estis la disvastigo de Esperanto kaj la kulturo de internaciismo kaj la valoroj ligitaj kun la perspektivo de laborista demokratio en la laborista klaso. En la disvolviĝo de siaj agadoj, SAT konverĝis kun LEA-oj, kaj tio kondiĉis la trovon de kadro de kohereco, kiu ebligis ilian komunan laboron daŭrantan multajn jardekojn ĝis la nuntempo. Tiam, kunlaboro inter ambaŭ specoj de organizoj estis pripensita: la rilatoj estis difinitaj en la Konvencio de Gotenburgo en 1928.




SAT sin difinis kiel organizon, kiu laboris per Esperanto en siaj celoj antaŭenigi la laboristan Esperanto-movadon, kaj la LEA-oj asociitaj al SAT konsentis labori por disvastigi Esperanton uzante la lingvon de la koncerna regiono kiel komunikilon. Kelkaj gravaj reguloj aldoniĝis al tio: la LEA-oj devis nomumi membron, kiu funkcius kiel konsultato kaj kontaktulo kun SAT, kiu siavice nomumus membrojn de sia Plenum-Komitato por konservi kontakton kun SAT, inter aliaj detalaj interkonsentoj. La SAT-membroj de LEA-oj starigis SAT-rondojn por prizorgi la SAT-laborojn.

La ampleksaj celoj de SAT certe faciligis kunigi la laboron de homoj, kiuj volas utiligi Esperanton kadre de la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda, fortigi la homecan solidaron, lernigadi la membrojn esti internaciistoj. Dum multaj jardekoj ĝis nun tiu rilato estas fruktodona por iliaj celoj.

Do, kiel ni vidas la estontecon de tiu komuna agado de LEA-oj kaj SAT? La LEA-oj aperas al ni kiel gravaj iloj por antaŭenigi la lukton de la esperantista laboristaro. La LEA-oj, aparte de klerigaj kaj eĉ nur ludaj aktivaĵoj, povas esti kampoj de politika diskuto pri la grava momento, kiun travivas la kapitalisma socio, kaj kiel proponi la lukton por ĝia superado mallongperspektive, mezperspektive kaj longperspektive. Pro tio, agado de la membroj de SAT por evoluigi LEA-ojn en la diversaj lingvaj areoj estus grava. Ilia funkcio devus esti plivastigi en la respektiva lingvo kaj, kie eble, en Esperanto la aron de valoroj, kiuj difinas SAT-on.

LEA-oj ebligus asocii la klopodojn de homoj, kiuj estas aŭ ne estas membroj de SAT, sed ĉiukaze en la perspektivo de la klasaj celoj de la laboristaro tutmonda. Ĝuste ĉi tiu speco de homoj, se ili ankoraŭ ne estas membroj de SAT, povas fariĝi tiaj en la estonteco.

Konsiderante ĉion diritan, ŝajnas, ke SAT-membroj devus aktive labori en ekzistantaj LEA-oj aŭ krei novajn LEA-ojn en lingvaj areoj, kie ili nuntempe ne ekzistas.

Guillem Gómez-Blanch kaj Miguel Sanchez

Julio 2025